# Novjorka Prismo

Numero 101 Februaro 2001

*La Esperanto-Societo de Novjorko*
*kore invitas vin al sia februara kunveno*

DATO: Vendredon, la 16-an de februaro 2001, 6:30-9:00 ptm

LOKO: United Federation of Teachers
260 Park Avenue South (20th/21st Streets), NYC
2nd floor (check schedule in lobby for room number)

PROGRAMO: 6:30 – Babilado kaj refreŝigaĵoj.
7:00 – **Lillian Rachele prelegos pri siaj spertoj kun Elderhostels.**
– **Libro-aŭkcio.** Ni forvendos la librojn, kiujn Julius Manson postmorte donacis al nia klubo. *Vidu liston de titoloj en Prismo de novembro 2000.* ★



## Protokolo de la kunveno de la 19-a de januaro 2001

Tomaso ECCARDT oficiale malfermis la kunvenon je 7:19 ptm. Nia kunveno estis ree en nia kutima konstruaĵo, 260 Park Avenue South, je la dua etaĝo. Dek tri personoj ĉeestis, inter ili David BARRIE, kiu kunportis pasteĉojn kaj vinon por honori la naskiĝtagon de Arthur BONETTI. La pasteĉoj enhavis etajn fruktojn de diversaj specoj. La ruĝa vino estis de la marko Fetzer, kaj ĝi estis perfekta por tiu-ĉi okazo.

Tomaso anoncis, ke la nova Esperanto-klaso ĉe Stuyvesant Adult Education Center komenciĝos la 12-an de marto.

Rochelle F. GROSSMAN anoncis pri la morto de Armin DONEI, el Texas kaj Wisconsin. Li estis iama prezidanto de ELNA kaj iama ĉefdelegito de UEA. Li havis 94 jarojn.

Tomaso ĉirkaŭenpasigis kelkajn kopiojn de la 100-a numero de *Novjorka Prismo*, kiu tro malfrue elsendiĝis por alveni al la domoj de la membroj antaŭ la kunveno de januaro 2001. Nature, ni ne povis voĉdoni por la akcepto de la protokolo de la kunveno de decembro 2000, ĉar neniu havis okazon legi ĝin antaŭ la kunveno.

Anstataŭ havi prelegon kiel kutime, la klubo havis enigmo-konkurson. Tom laŭtlegis regulojn kaj Rochelle gvidis la konkurson. Jen kelkaj enigmoj uzitaj en la konkurso. *[La respondoj aperas sur paĝo 2.]*

1. Kion oni diras kiam vespo pikas?
2. Homo kiu loĝis en loĝturo kutime iris per lifto rekte malsupren de la 50-a etaĝo ĝis la teretaĝo. Hejmenirante, li iris unue al la 35-a etaĝo kaj daŭrigis piede per ŝtuparo ĝis la 50-a. Kial?
3. Kio estas tute bona Esperanto vorto, kiu povas havi la signifon 'ĵurnalisto bovina' en la angla?
4. Kial bicikleto falas, kiam ĝi ne moviĝas?
5. Mi estas laboranto, kiu gvidas 27 aliajn laborantojn. Sen mi, reĝa palaco ne povus esti surbaze de la placo. Kiu mi estas?
6. Oni forŝtelis kamelon de judo. Policano demandis al la judo, "Kiu sekso estas la kamelo?" La judo respondis "Virseksa". La policano demandis "Kiel vi scias?"
7. Estas 2 patroj kaj 2 filoj en ĉambro, sed nur estas 3 personoj tie. Kiel tio povas esti?
8. Kia besto iras kvarpiede matene, dupiede tagmeze, kaj tripiede nokte?
9. De kiu nacieco estas virino en lito kun vino?
10. Estis 24 kuketoj sur telero. Estis 24 personoj. Se ĉiu persono prenis unu kuketon, kial restis unu kuketo sur la telero?
11. Kiel oni povas ŝanĝi homon en beston per la interŝanĝado de nur du literoj?
12. Kio estas tiel granda kiel elefanto, sed ne havas pezon?
13. Vi venas el Tokio, kaj persono demandas al vi "Kio estas via nacieco?" kaj samtempe alia persono demandas al vi "Kion vi volas manĝi?" Kiel vi respondas al la du demandoj samtempe per unu frazo?
14. Kio plialtiĝas, sed neniam malplialtiĝas?
15. Kio estas via, sed aliaj personoj uzas ĝin pli ofte ol vi uzas ĝin?
16. Kiu Esperanto vorto estas ĉiam literumigita malĝuste?
17. Kial persono, kiu malamas virinojn, neniam legas ĵurnalon?

La gajnantoj de la konkurso estis Stuart GREEN kaj Sofia SOSKINA. La premioj estis malnovaj kopioj de la libroj *Plena Ilustrita Vortaro* kaj *Plena Analiza Gramatiko*.

Post la konkurso, Tomaso oficiale fermis la kunvenon. ★

*Protokolis: Stuart GREEN*

## Vespero de muziko el Usono kaj Azerbajĝano


Mi ĉeestis la piano-koncerton, kiun prezentis nia samklubano Jon Liechty, je la 9-a de februaro. Fakte oni devus aldoni 'el Pollando' ĉar Jon komencis per *Fantasie-Impromptu* de Chopin. Post Chopin, li ludis *Shushlar*, azerbajĝana peco, kiu tamen enhavis arpeĝojn similajn al la Chopin. Jon ankaŭ ludis pecon de la usona komponisto John Harbison kaj unu de si mem, nomata *Najloj*. Mi certas, ke mi aŭdis aŭ najlojn aŭ almenaŭ marteladon. Mi mem plibone komprenis la muzikan strukturon de ĝi ol de la aliaj modernaj pecoj. La koncerto finiĝis per plia azerbajĝana peco, *Moods*, kun 12 peceroj, kiuj, mi supozis, reprezentas humorojn de la komponistino aŭ de ŝia patrino, al kiu la peco estis dediĉata.



Ŝajnas, ke Jon estas talenta, serioza muzikisto. ★

*– Tom ECCARDT*

## Learn Esperanto for free!




Our free course in Esperanto for beginners begins again on Monday, March 12, 2001. No registration is necessary, just come to the Stuyvesant Adult Center at 345 East 15th Street (near First Avenue) room 411 at 7:30 PM. ★

*– Tom ECCARDT*

## Estrara kunsido

La kvaran de februaro je tagmezo la estraro de ESNY kunvenis por diskuti kelkajn aferojn. La estrara kunveno facile iĝis la kutima neformala kunveno je la 1-a horo. Ni diskutis pri metodoj por kuraci la malfruecon de *Novjorka Prismo*. Unu solvo povus esti malgrandigi la monatan *Prismon* ĝis anonco kun novaĵoj, kalendaro, kaj protokolo. Iu ajn kun komputilo povus produkti ĝin, kaj oni devus nur faldi ĝin kaj sendi. Kelkajn fojojn jare, oni povus aldoni literaturaĵojn, kaj kunsendi ĝin kiam ĝi estos preta kun la venonta anonco. Fakte, ni ne voĉdonis pri tio, kaj ni preferus alian solvon. Ni ankaŭ diskutis pri la listo de homoj kaj kluboj kiuj ricevas *Prismon*. Ni decidis sendi *Prismon* nur al homoj aŭ kluboj kiuj iel respondas (aŭ sendas la aliĝilon aŭ sendas al ni novaĵleteron), tiel ni povos uzi nian monon pli efike, eble por anonco en ĵurnalo aŭ revuo. Ankaŭ ni diskutis pri ŝanĝi la datojn de niaj kutimaj klubkunvenoj. La plejparto de la estraranoj kaj de la ĉeestantoj de la neformala kunveno ne deziras ŝanĝon, sed oni mencios tiun eblecon ĉe la februara formala kunveno. Finfine ni diskutis pri nia multekosta bankkonto. Post la kunveno mi eklernis, ke kiel neoficiale neprofitcela organizo, ni rajtas peti taxpayer ID number de la federala registaro. Tio ebligos nin malfermi novan, malpli multekostan konton, kun la nomo ESNY, kaj ne je la nomo de homo. Do, mi plenumis kaj sendis la formularon. Post la estrara kunvenoj, kelkaj pliaj homoj alvenis, kaj ni daŭrigis la konversacion. ★



*– Tom ECCARDT*


## Esperanto ĉe mp3.com

Saluton al ĉiuj!

Sep niajn kantojn el la albumo *Valso Por Amikoj* estas aŭdeblaj kaj elŝuteblaj ĉe:

*www.mp3.com/JomartNatasha*

Laŭ mi estas tre bona okazo por popularigi Esperanton ĉar ju pli da aŭskultantoj venos al la adreso des pli videblaj la kantoj estos por ĉiuj, kiuj vizitos la mp3.com. Kaj tiu interretpaĝo estas ege populara en la tuta mondo. Eble tiam ankaŭ aliaj esperantistoj



aperigas siajn kreaĵojn tie. Ĝuste nun ni estas la unuaj (!) kaj la solaj Esperanto-artistoj tie.

Ni petas al ĉiuj esperantistoj subteni nin kaj mem iri al la supra adreso kaj aŭskulti la kantojn. Laŭeble informu aliajn esperantistojn (neesperantistojn?) pri la ebleco. ★

– Esperante pri bona reeko, amike
*Ĵomart kaj Nataŝa <jomart@telia.com>*
*Kontribuis Sofiya SOSKINA*

## Solvoj de la enigmoj

1. Bonan Vesperon!
2. Li aŭ ŝi ne estas sufiĉe alta por atingi la butonon por elekti la 50-an etaĝon!
3. Preskaŭ!
4. Ĉar ĝi estas "tired"!
5. La litero "a"!
6. La judo, kiu nun koleriĝas je la policano, diras "Aza schmuck!"
7. La avo ankaŭ estas la patro de la patro, kaj la patro ankaŭ estas filo de la avo!
8. Homo. Li rampas dum li estas bebo, piediras rekte dum li estas plenkreskulo, kaj piediras kun helpo de bastono kiam li estas tre aĝa.
9. Litovino.
10. La lasta persono prenis la teleron kun la lasta kuketo (t.e., la lasta kuketo restis sur la telero).
11. Se la 'R' kaj la 'U' en 'RUSO' interŝanĝiĝos, 'RUSO' estos 'URSO'.
12. Ombro de elefanto.
13. Ja, pano.
14. Via aĝo.
15. Via nomo.
16. "Malĝuste".
17. Ĉar la in-formoj ne plaĉas al li.

*– Stuart GREEN*

## Societa kalendaro

Venu al niaj venontaj renkontiĝoj! Metu tiujn datojn en vian kalendaron.

**Februaro** **16**

**ESNY Kunveno – Libroaŭkcio!**
*Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT*

**Marto** **4**

**Tagmanĝo**
*Dimanĉon, 1:00 ptm ĉe SONY Plaza*
(Limdato por kontribuaĵoj por *Prismo* 102)

**12**

Free Beginners' Esperanto Class begins at Stuyvesant Adult Center
*Mondays, 7:30-9:00 pm, thru 4/30*

**16**

**ESNY Kunveno**
*Friday, 6:30 pm at UFT*

**United Federation of Teachers (UFT)**
260 Park Avenue South, NYC
(20th/21st Streets), second floor
(check schedule in lobby for room number)

**SONY Plaza Atrium**
Madison Avenue (55th/56th Streets) NYC
Street level, in the Atrium

**Stuyvesant Adult Education Center**
345 East 15th Street (1st/2nd Avenues) NYC
Fourth floor, room 411

## Solvoj de la krucvortenigmo (*Prismo* 100)

| | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 F | 2 E | L | I | Ĉ | 3 A | 4 N |
| 5 A | V | ■ | ■ | ■ | 6 L | I |
| 7 M | I | ■ | 8 L | 9 I | F | T |
| 10 I | T | ■ | ■ | 11 R | A | R |
| 12 L | A | ■ | 13 N | U | B | A |
| 14 I | D | ■ | ■ | ■ | 15 E | T |
| 16 A | I | L | A | N | T | O |

*– Lillian RACHELE*


**ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO**
c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017 (212) 687-7041
http://www.geocities.com/esperanto_nyc

Prezidanto: Thomas Eccardt (212) 477-6516
Koresponda Sekretariino: Rochelle F. Grossman (718) 457-1490
Protokolisto: Stuart Green (631) 751-5683
Vicprezidanto: Thomas Leong (718) 981-4252
Kasistino: Sofiya Soskina (718) 671-5699
Program-Direktoro: Susan Kohn (212) 226-0443

**Novjorka Prismo**
Numero 101 – Februaro 2001
ISSN: 1059-5627
http://members.aol.com/novjorka/prismo

Redaktoro: Jim Medrano (212) 982-5029
Subredaktoroj: Thomas Eccardt, Nancee Medrano
Desegnistino: Mary Pulley

Sendu kontribuaĵojn al:
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103
e-poŝto: jimmedrano@mac.com


© 2001 Esperanto Society of New York